

B

Brazila Esperantisto

OFICIALA ORGANO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO

III-a jaro - N-ro 360 - Majo 2018



KURITIBO



2018



53^a BRAZILA
KONGRESO DE
ESPERANTO



38-a Brazila Esperantista
Junulara Kongreso



**Esperanto: kapabligo por instruado,
esploro kaj etendiĝo**

de la 31-a de majo ĝis la 03-a de junio 2018

ISSN 0006-9477



esperanto.org.br



Kovrilo: Evandro Avellar

- 01 Enkonduko** Bonvenon esperantistoj!
- 02 Ĉefartikolo** Brazila Kongreso de Esperanto kaj Kuritibo
- 04 Steldomo en Kuritibo** Kulturo
- 06 Aktivado de Biblioteko en 53-a BKE** Biblioteka Angulo
- 07 Duo honoras sian verdon** Lingva Angulo
- 08 Propono al nova estraro de BEJO** Brazila Movado
- 09 1-a Kurado kaj Marŝado en BKE** Sporto
- 10 KER-Ekzamensesio en Kuritibo dum BKE** Brazila Movado
- 12 Financaj Raportoj - Rezulto 2017** Informoj
- 14 Kampanjo Brazila Kolekto** Kulturo kaj Movado
- 18 Programo BKE kaj BEJK** BKE
- 19 La protektantoj de niaj kongresaj ĉambroj** BKE

53-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

38-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso



Revukunlaboraĵoj: La ĉefredaktisto rigardas gravaj la kunlaboraĵojn senditajn de legantoj. Tamen, pro hommanko, spaclimigoj en la revuo, kaj kromaj limigoj, li rezervas al si la rajton: **1-e:** ne sciigi la ricevon; **2-e:** ne redoni la sendaĵojn; **3-e:** ne garantii la publikigon; **4-e:** mallongigi tekstojn tiam, kiam necese; **5-e:** ilin reviziigi laŭ ortografio, gramatiko kaj fakvortoj. **a)** Kiel gramatikan konsultfonton ni rekomendas la verkon Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko, de Bertilo Wennergren. **b)** La signifon de ĉiuj vortoj netroveblaj en Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (2005) oni aparte klarigu per piednotoj aŭ glosaro. **c)** Ni uzos esperantigitajn ŝtato-nomojn kaj urbonomojn trovitajn en <http://vortaro.esperanto.org.br>. **d)** Ĉiam kiam eblas ni uzos simplajn vortojn kompreneblajn kaj konstruatajn surbaze de la krea kapablo de Esperanto anstataŭ la novaj radikoj (neologismoj) laŭ <http://bonalingvo.net/> **e)** Ni uzos la sistemon -UJO por landnomoj laŭ la fundamentaj reguloj de la lingvo (kiujn oni eltiras el la libreto La Fundamento de Esperanto).

Komercaj markoj reproduktitaj celas nur ilustrati kaj apartenas al la posedantoj.

Anonctarifoj: Tabelo pri prezoj de anoncoj en *Brazila Esperantisto*, laŭ paĝonoj.

	tutpaĝa (19x25cm) 4-a kovrilo R\$ 900,00 (kolora) 2-a kaj 3-a kovriloj R\$ 600,00 (nigra-blanka)		1/2 duonpaĝa (9x24cm) R\$ 450,00 (kolora) R\$ 300,00 (nigra-blanka)		1/3 trionpaĝa horizontale (8x18cm) R\$ 300,00 (kolora) R\$ 200,00 (nigra-blanka)		1/3 trionpaĝa vertikale (8x18cm) R\$ 300,00 (kolora) R\$ 200,00 (nigra-blanka)		1/6 sesonpaĝa (7,8x8cm) R\$ 150,00 (kolora) R\$ 100,00 (nigra-blanka)
--	--	---	---	---	---	---	---	---	--

Koré-Tuba – Kuritibo

Unue nur vilaĝeto, aperiĝinta meze de 1649 post ekspedicio gvidita fare de Generalo Eleodoro Ébano Pereira kun la celo malkovri oron. Ĝi komenciĝis en la loko nomata Vilinha (ĝuste Vilaĝeto), ĉe la bordo de la rivero Atuba, poste translokiĝinta la vilaĝeto al la loko, kie hodiaŭ estas Placo Tiradentes. La unuaj loĝantoj estis indianoj, Tupi-Gvaranioj, Ĵeoj kaj Tingvioj, kiu nomis la lokon Koré-Tuba, kio signifas "pinarbaro" aŭ "multe da pino-nuksoj".

La 29-an de marto 1693 la vilaĝo fariĝis Vilaĝo de Nia Sinjorino de la Lumo de la Pinarbaroj (Vila de Nossa Senhora da Luz dos Pinhais). La 8-an de februaro 1842 ĝi pasis al la titolo urbo Kuritibo kaj en 1853 iĝis la ĉefurbo de la provinco Paranao.

Strategia loko, ĝi estis haltejo por brutaristoj, kies komerco kaj agadoj altiris pli kaj pli da homoj. Ĉi tiu urbo malfermis siajn pordojn al multaj etnaj grupoj kaj iom post iom iĝis multetna urbo, riĉigita de diversaj kulturoj.

L. L. Zamenhof fierus pri la urbo Kuritibo, urbo, kiu gastigis tiom da popoloj kaj fariĝis hejmo al multaj. Ĝian silueton transformis la kulturo alportita de ĉiuj, ĉu pri manĝaĵo, agrikulturo, urb-anismo, industriiĝo, arkitekturo kaj pejzaĝo.

Malgraŭ la normalaj malfacilaĵoj, ĉi tie ni klopodas egalecon kaj vivkvaliton por ĉiuj, bazitaj sur la radikoj, tradicioj, modernigo kaj valoro de ĉies scio. Ĉiuj havas sian gravecon kaj partoprenon, de la indianoj, portugaloj, afrikanoj, eŭropanoj, azianoj, araboj, la haitianoj ĝis ĉiuj, kiuj elektis Kuritibon kiel hejmon, ĉar ĉiuj kontribuis siamaniere per io speciala.

Kuritibo estas modela urbo, kie oni lanĉas

plurajn projektojn, ĉar la lokanoj estas pozitive tre postulemaj, tiel ke, se ili aprobas iun projekton lanĉitan ĉi tie, tio signifas, ke ĝi havas grandan probablon sukcesi en aliaj partoj de la lando. Pro la kuritiba latitudo kaj longitudo, la urbo estis elektita kiel unu el la idealaj lokoj por la Templo Rozo-Kruco kaj ankaŭ unu el la kapeloj de la Sanktejo de Nia Sinjorino de Schoenstatt. Fine ĝi havas la ununuran Stel-Domo, simbolo de Esperanto.

Kun granda ĝojo Kuritibo malfermas siajn brakojn por akcepti la esperantistojn el la tuta Brazilo. La Brazila Kongreso de Esperanto estos momento en kiu ĉiuj povas paroli kaj pensi kaj repensi pri tiu filozofio kaj harmonia maniero pensi la vivon kaj klopodi pli bonan mondon. Esperoplenaj, la kuritbanoj, kiuj estas amantoj de paco, harmonio, kulturo kaj egaleco, atendas ankaŭ la eblecon gastigi la Universalan Kongreson de Esperanto. Komforta loĝejo de multaj popoloj kaj etnoj, tenanta kulturan diversecon kaj tradiciojn kaj pro sia vivkvalito konsiderata unu el la plej bonaj urboj por vivi en Brazilo, Kuritibo eklaboras por baldaŭ gastigi la UK-on. Tiel ĉi tiu ĉefurbo kronus sian historion, fariĝante la monda podio de la esperantistoj, kiuj celas pacon, egalecon inter la popoloj kaj harmonion al nia planedo.

Bonvenon, esperantistoj!

Carlos Hauer Amazonas de Almeida

Kunordiganto pri Lingvoj

Etna Pavilono de Kuritibo

Nome de Fundação Cultural de Curitiba

Brazila Esperantisto

ISSN 0006-9477

Oficiala Organo de Brazila Esperanto-Ligo

Fondita en 1907 de Alberto A. Vieira, Reynaldo Geyer kaj Everardo Backheuser
111-a jaro, N-ro 360, Majo 2018

Eldona Stabo

Ĉefredaktisto: Evandro Avellar
redakcio@esperanto.org.br

Ĉi-numeraj kunlaborantoj: Evandro Avellar, Fernando Maia Jr., Flávio Fonseca, Ivan Colling, James Piton, José Querino, Karina Oliveira, Leandro Silvestre, Marcionilo Vasconcelos kaj Neia Lúcia Souza

Grafika aranĝo kaj enpaĝigo: Evandro Avellar

Revizio kaj tradukado: BEL-asesorskipo

Kontribuajlojn kaj mesaĝojn sendu al la ĉefredaktisto: redakcio@esperanto.org.br

Pri la subskribitaj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

Brazila Esperanto-Ligo (Fondita en 1907)

Sidejo: SDS–Bloco P36–Salas 301/303–Ed. Venâncio III CEP 70393-902 Brasília, DF

Telefono: (0xx61) 3226-1298

Retadreso: bel@esperanto.org.br Hejmpaĝo: www.esperanto.org.br

Estraro

Prezidanto: Evandro Avellar

Vicprezidanto: Euripedes Barbosa

Financa direktoro: Fernando Maia Jr. Kasisto: Vaka posteno

1-a Sekretario: Emílio Cid

2-a Sekretario: Josia Barboza

3-a Sekretario: Darci Sardinha

Kontrola Konsilantaro

Paulo Nascentes, Sérgio Neri, James Piton

Federacia Konsilantaro

Prezidanto: Joacir Camboim

Komitatano A: Rafael Henrique Zerbetto

Ĉefdelegito de UEA: Alex Sousa Santos

B
r
a
z
i
l
a

E
s
p
e
r
a
n
t
i
s
t
o

1

N
r
o

3
6
0

M
a
j

2
0
1
8

8

Kuritibo



Memorialo de Kuritibo

Ĉijare ni havas du kongresejojn! Nia unua kongresejo estos la Universitato UNINTER, kampuso Divina, ĉe Strato Do Rosário 147, Urbocentro de Kuritibo. Tie ni povos sekvi prelegojn kaj aliajn aktivajn, krom viziti la libroservon de Brazila Esperanto-Ligo. Kaj kiel nian duan kongresejon ni havos la Memorialon de Kuritibo por la artaj prezentoj, Movada Foiro kaj la solenaj malfermo kaj fermo. La Memorialo situas ĉe Strato Claudino dos Santos 79, Largo da Ordem, kvartalo São Francisco. Kaj ne zorgu: la Memorialo staras ĝuste fronte al Uninter, do oni ne bezonos trankvili longajn distancojn por ĝui la programerojn.

Kio pri la bela urbo Kuritibo? Ĝi estas la ĉefurbo de Paranao, unu el la tri provincoj, kiuj konsistigas la Sudan Regionon de Brazilo. Ĝi estis oficiale fondita en la 29-a de marto 1693, kiam oni kreis la lokan magistraton. En la 17-a



Botanika Ĝardeno

jarcento ties ĉefa ekonomia aktivajo estis minado, kune kun la porvivaĵa agrikulturo.

Havante multe da vizitindaĵoj, kiel la Botanika Ĝardeno, la Teatro Ópera de Arame kaj la Muzeo Oscar Niemeyer, krom parkoj kaj boskoj, la paranaa ĉefurbo estas la deirpunkto

al du belaj vojaĝoj: unu per trajno al Serra do Mar kaj alia per aŭto laŭ la Ĝoseo Graciosa. Ambaŭ estas vojo al Morretes, kie eblas gustumi tipan pladon de la regiono, nomata bar-



Teatro Ópera de Arame

reado, farita el kuiritaj viandoj kaj faruno el manioko. Sed ankaŭ en Curitiba ĉie estas bona manĝaĵo, speciale en la kvartalo Santa Felicidade, fama pro la kantinoj, kiuj ofertas laŭvolajn manĝadojn kontraŭ la plej bona prezo de la itala kuirarto.

La Botanika Ĝardeno kaj la Teatro Ópera de

Arame estas la ĉefaj simboloj de Curitiba. En la unua, bela konstruaĵo el metalo kaj vitro loĝigas 50 speciojn el la Atlantika Arbaro. La moduro ne povus esti pli perfekta: geometriaj ĝardenoj, skulptaĵo kaj padoj. Aldone estas la Botanika Muzeo, kiu enhavas pli ol 400 mil specioj. Aliflanke la Teatro disponas je du spacoj: la subĉiela Ŝtonminejo Paulo Leminski kun kapablo por pli ol 30 mil homoj; kaj la Ópera de Arame mem konstruita surlage, kun metala strukturo, travideblaj muroj, loĝioj, parteraj seĝoj, kapabla enhavi 1.600 homojn. Ĝi vizitindas eĉ kiam ne estas afiŝita iu spektaklo. Krom ĉio tio estas la Muzeo Oscar Niemeyer, projekto de la fama brazila arkitekto, kiu estas pli konata kiel Museu do Olho (Muzeo de la Okulo). Tiu loko estas unu el la plej belaj de la urbo, kie eblas viziti ekspoziciojn.

Tradukis: Leandro Silvestre kaj Fernando Maia Jr.

Fontoj: Urbo-domo de Curitiba & Eldonejo Férias Brasil.



Muzeo Oscar Niemeyer

Fpto: PUCPR

REALIGITA REVO
Inaŭgura solenaĵo
en Kuritibo

**INTERNA
IDEO**
Augusto G.
de Castro
portante la
Verdan
Stelon sur la
brusto






Steldomo en Kuritibo

Kuritibo, 1930-aj jaroj. Augusto Gonçalves de Castro (1891-1971) entreprenas konstrulaboron, kies rezulto hodiaŭ estas arĥitektura monumento unika en la mondo. Esperantisto en la 1-a de Majo 1925 li fondis Paranaan Esperanto-Asociacion – kaj teozofo, Castro elpensis, projektis kaj mem konstruis lignan domon, kiu estas materiigo de liaj lingvaj kaj filozofiaj ideoj kaj idealoj. En la projekto, li harmonie kunigis du ĉefajn temojn: la sespintan stelon, simbolon de teozofio, kaj la kvinpintan stelon, simbolon de Esperanto. Pro sia originala ideo, li proponis al si mem grandan defion konstrui domon kun malmultaj ortaj anguloj. Proksimume kvar jarojn li laboris, dum sia libera tempo, uzante karbidan lampon por lumigi la lokon. La domo ankoraŭ ne estis preta, kiam li, lia edzino Dionísia kaj la gefiloj Idalina kaj Moysés ekloĝis en ĝi; poste naskiĝis la tria filo, Carlos. Grava mencienda detalo: Augusto de Castro estis ne arkitekto aŭ inĝeniero, sed librotenisto! La ĉefa salono de la domo estas kvinangula. Ĉe ĉiu latero estas ĉambro, kaj ĉiu el la kvin ĉambroj egale komuniĝas kun la salono. Ĉi tio estas alegorio de la lingva egalrajteco proponata kaj defendata de Esperanto. Ankaŭ en la supra etaĝo ĉiuj dormoĉambroj ligiĝas al la centra areo; sur la plafono videblas kvinpinta verda

stelo. Kion pri la kelo de la domo? Estas antikva foto montranta instruistinojn ĉe nigra tabulo, sur kiu legeblas: "Mi parolas Esperanton. Ĝi estas tre bela lingvo"! Fakte, en la domo funkciis nokta lernejo, en kiu oni instruis matematikon, desegnadon, klasikan grekan, la latinan, la francan, la germanan, kaj Esperanton.


Stel-Domo situas en kvartalo Altaĵo de Glória, ĉe strato D-ro Zamenhof, 56 (danke al iniciato de Castro, tiu estas la nomo de la strato ekde 1953). Ĝi estis malmuntita kaj rekonstruita en tereno de Pontifika Katolika Universitato de Paranao; tiun restaŭrolaboron gvidis arkitekto kaj docento Claudio Maiolino. La inaŭguro okazis la 6-an de Junio, kaj dum la ceremonio teatra grupo "Tanahora" deklamis poemojn en Esperanto kaj en la portugala. Inter ili, laŭ mia propono, poemon de Geraldo Mattos el la jaro 1968, omaĝantan la tiaman prezidanton de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Braz Cosenza. Castro kaj Zamenhof havis similajn ideojn pri interhoma frateco per dialogo inter religioj kaj inter mondkonceptoj kaj per uzo de komuna neŭtrala planlingvo. La voĉoj de tiuj du geniaj homoj kune sonu en PUCPR: apud Stel-Domo estis inaŭgurita en la sama tago Amfiteatro Doktoro Zamenhof.

Fonto: Inko n-ro 74 - 2013



Aktivado de la Biblioteko en la 53-a Brazila Kongreso de Esperanto

Néia Lúcia Souza



Carlos Maria el TEK vizitas la Bibliotekon

Dum la la 53-a Brazila Kongreso de Esperanto eblos informiĝi pri la situacio nuntempa de Biblioteko Carlos Domingues, kiel stas la organizado de la libro-kolektoj kaj la Programo Amikaro de la Biblioteko. La 2-a de junio je la 15-a horo Néia Lúcia Souza prezentos la "Biblioteka Kuriero"-n.

La unua brokant-ago de BCD okazis dum la 52-a BKE, em Sorriso -MT, 2012, kaj estis

sukcesplena – ĉiuj libroj estis venditaj.

Pasintaprile la brokantejo iris al la monata Matenkafo de Taguatinga Esperanto-Klubo-TEK, kaj la triafojo estos dum la 53-a BKE, em Kuritibo.

Tiu entreprenado celas akiri monon por la biblioteka elspezoj, kiuj estas detalitaj en la Programo Amikaro de la Biblioteko kaj liveri spacon en nia deponejo.

La brokantaĵoj estas libroj kiuj ne eniros en la bibliotekan kolekton.

Kial ili ne eniros en la kolekto?

1) Jam estas tri aŭ kvar ekzempleroj katalogitaj.

2) La ekzemplero estas iel difektita aŭ tro substrekita.

Ne maltrafu la ŝancon viziti nian brokantejon kaj eventuale trovi unikajon por via lego-ĝuo. La prezoj estas tre favoraj. ■

Brokantaĵoj [Laŭ Plena Ilustrita Vortaro]

Brokanti: (per aŭ tr) Profesie aĉeti kaj vendi jam uzitajn, ordinare malmulte valorajn objektojn: *brokanti per malnovaj pasamentoj k bukaj^z; brokanti per pentraĵoj, mebloj.*

brokante. Agante en kondiĉoj de bro-kanto: *aĉeti, vendi brokante.*

brokant(ad)o. Tia komerco.

brokantaĵo. Objekto, kiun oni povas brokanti.

brokantisto. Tiu, kiu brokantas.





Marcionilo Vasconcelos

Duo honoras sian verdon!

Konatiĝinte kun la esperantistaro, konstateblas ke la vojo uzita de la homoj por akiri fluecon en la Esperanta lingvo estas tre diversa. Kiu neniam aŭdis pri homoj kiuj lernis la lingvon per koresponda kurso dum la pasinta jarcento? Kiu neniam ekkonis homon kiu memlernis la lingvon per libroj? Kiom aliaj lernis ĝin per ĉeesta kurso? Tamen, dum la lastaj jaroj aperis nova aro da Esperantistoj, nome: tiuj kiuj memlernis(as) la lingvon per la reto.


Unu el la plej mondkonata maniero estas tiu per la retumejo de **Duolingo**, la fama verda strigo, kiu jam instruis Esperanton al anglaj kaj hispanaj parolantoj kaj nun faras siajn flugojn al portugallingvaj parolantoj ĉirkaŭ la mondo. Lanĉite en la 14-a de majo, la Esperanta kurso de Duolingo nun ebligas al diversaj homoj lerni la internacian lingvon per

la portugala. Kun aro de 7 homoj, la teamanoj kiuj ebligis tiun okazaĵon, nun feliĉas kaj laboradas revizianta la kurson kiu ellasis la "kovan staton" kaj nun estas en la "prova stato", dum kiu la homoj povas jam lerni Esperanton dum la teamanoj revizias la kurson, tiel celante la pliperfektigon de la sistemo.

La apero de tiu nova kurso certe vidigos alian perspektivon por la lingvo, elmontrante al pluraj homoj ke Esperanto vivas kaj estas moderna lingvo, per kiu eblas konatiĝi kun la tutmonda kulturo kaj aniĝi al movado celante la internacian interkomprenon per demokratia lingvo. Specialan dankon al la teamanoj Karina de Oliveira, Túlio Flores, Emerson Werneck, Wesley Alcoforado, Marcionilo Vasconcelos, Querino Neto kaj Luna Silva. Ekkonu la esperantajn instruojn de la saĝa strigo kiu pli kaj pli honoras sian verdan koloron!



Propono al nova Estrato de BEJO: Konu "KvindEKO"-n



BEJO-Skipo

Pasintjare, Brazila Esperanta Junulara Organizo (BEJO) festis sian jubileon, momento dum kiu eblis al la movado analizi kaj pripensi siajn rezultojn kaj venontajn celojn. Ĉi-jare, okaze de la neceso elekti novan teamon por estri la organizon dum la du venontaj jaroj, "KvindEko!" prezentiĝas al la publiko.

KvindEko, kies nomo proponas novan komencon por la juna movado post la pasintaj 50 jaroj, sinprezantas kun konkretaj proponoj por BEJO. La estraron partoprenas kiel prezidanto Querino Neto (AL), studento pri Juro, eksa ĝenerala sekretario de BEJO, komitatano A kaj komisiito pri Edukado de TEJO, kiel vicprezidanto Karina Oliveira (SP), akademia esploristo pri Esperanto, doktoriĝanta je Lingvistiko ĉe USP, kiel ĝenerala sekretario Luana de Mello (PR), media inĝenierino kaj aktivulino en pormedia organizo (REJUMA) kaj kiel kasisto Emerson dos Santos (AL), kiu studis Administradon kaj estas aktivulo en la Esperanta movado kiel juna preleganto kaj kantisto.

Plue, por la fiska konsilantaro, kandidatiĝas Alan Argolo (RJ), studento pri Civila Inĝenierio, kiu jam akvitis/as en diversaj postenoj de BEJO, kaj estas la nuntempa vicprezidanto de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro (AERJ), Marcionilo Vasconcelos (PE), instruisto pri Esperanto kaj kunlaboranto de Movada Rubriko en la revuo Kontakto de TEJO, Júlio Raiol (PA), studento pri Turismo, vicprezidento de la Esperanta Klubo Zamenhof (EKZ) en Belém kaj Marton Paulo (PE), studento pri Komputiko kaj kunlaboranto de la Pernambuka Esperanto-Asocio (PEA).

En lanĉo de tiu teamo, la ĉefaj planoj intencas alfronti la nuntempajn defiojn de la Esperanta movado nacie kaj internacie, aktivigi la junularon por sociaj agadoj, modernigi la komunikrimedojn kun la junuloj, kaj tiel inkludigi BEJO-n en la perspektivon de la junularo. Simile al tio kio okazas en TEJO, la nova estraro kreas komisionojn por helpi la procezojn kaj plibonigi la laboraĵojn okazigatajn de la organizo. Tiuj komisionoj celas precipe la temojn pri projekto, historio kaj patroneco, redaktado kaj regiona agado.

Krome, la nova estraro de BEJO planas stimuli la fondiĝon de ŝtataj junularoj kaj oficialigi ilin, ekzemple de Karioka Esperantista Junulara Organizo (KarEJO), kontakti kaj ebligi kontakton de BEJO kun aliaj organizoj, ĉefe porjunaj, estigi la akademian engaĝiĝon, intensigi la kontakton inter latinamerikajn junularajn E-organizojn, krei konkursojn artistajn kaj sciencajn kaj helpi junulojn vojaĝi por partopreni esperantajn aranĝojn, kongresojn kaj poresperantajn laborcelajn vojaĝojn. ■





Jam pli ol 200 homoj aliĝis al la 1-a Kuradon kaj Marŝado Esperanto por Paco kaj Diverseco. Ĝi estas sporta piediranta konkurso laŭ la distancoj 4 km, 8 km kaj Infana, por homoj de ambaŭ seksoj kaj ĉiuj aĝoj, formale aliĝintaj, okazonta sub kiu ajn normala vetera kondiĉo ĉe Parko Tingui, Kuritibo, la 3-an de junio 2018, j ela 8-a horo. Kotizoj varias laŭ kategorio inter R\$35 kaj R\$55, tiu lasta inkluzivante ĉemizon (kontrolu disponeblecon). Sendepende de la alventempo, ĉiuj kompletigintoj gajnos belegan medalon! Ĝin okazigas PEA - Paranaa Esperanto-Asocio, sub kunordigo de la grupo Elite Eventos, kiel parto de niaj 53-a BKE 2018 / 38-a BEJK 2018, apogita de BEL kaj BEJO. Por aliĝi, aliru: <https://goo.gl/CRnguG> aŭ kontaktu nian ĉeforganizanton kaj heroinon Ariádene (Arinjo): +55 (41) 99571-9264. Kaj, se vi volas, portu vian blankan flageton!

Kuru! Partoprenu la 1-an Kuradon kaj Marŝadon Esperanto por Paco kaj Diverseco!

KER-Ekzamensio en Kuritibo dum la 53-a Brazila Kongreso de Esperanto

Ivan Eidt Colling



Tabelo 1 – Landoj kun pli da aprobitoj en KER-Eo.

Lando	Aprobitoj
Francio	504
Brazilo	232
Rusio	146
Meksiko	108
Germanio	82
Ĉinio	73
Hispanio	72

La indeco ellabori *Komunan Eŭropan Referenckadron* (KER) por lingvolernado estis pritraktita en interregistara simpozio en Rüşchlikon, Svislando (1991). Estas interese konstati, ke, almenaŭ teorie, en la idearo naskanta KER-on troviĝas celoj alrigardataj ankaŭ de esperantistoj: efika komunikado, respekto por identeco, por kultura diverseco, interhoma agado, interkompreniĝo. Dek jarojn poste, en Eŭropa Jaro de la Lingvoj, estis prezentita la ĉefa dokumento de KER. Nuntempe en la sistemo de KER estas kvardek lingvoj. La akcepto de Esperanto okazis fine de 2007, post plurjara laboro de grupo da lingvistoj kaj instruistoj: Katalin Kováts, Zsófia Kóródy, Márta Kovács kaj Mireille Grosjean. Ĉi tiu akcepto estas gravega lingvopolitika atingo, kaj ĝi signifas agnoskon de Konsilio de Eŭropo, ke la planlingvo Esperanto estas moderna vivanta lingvo.

Universitato Eötvös Loránd (Budapeŝto, Hungario) respondecas pri la esperantlingvaj ekzamenoj (KER-Eo), kiuj nuntempe ekzistas por niveloj B1, B2 kaj C1, kun la eblo aparte aliĝi al la skriba parto, al la parola parto, aŭ al ambaŭ. De la komenco de la ekzamenado, en 2008, ĝis la fino de la pasinta jaro, entute 2012 esperantistoj el 71 landoj rajtis ricevi siajn atestilojn de lingvokono: 579 je nivelo B1, 594 (B2) kaj 839 (C1). En 2018 jam okazis sesioj en Greziljono kaj en Moskvo (kun entute 19 kandidatoj). La landoj kun pli da aprobitoj aperas en tabelo 1 (kies sumo korespondas al 60% de la totalo); la elstara pozicio de Brazilo respegulas la forton de nia movado.

Eblas subiĝi al KER-Eo kadre de Esperanto-aranĝoj aŭ de Tutmondaj Sesioj (TES). Tiel, jam estis sesioj en pli ol 80 urboj – en 40 el ili, tio okazis plurfoje. Parizo, Moskvo kaj Kuritibo estas la tri lokoj, kiuj partoprenis ĉiujn ĝisnunajn ses Tutmondajn Sesiojn. Specife pri Brazilo, vidu tabelon 2.

Ĉi-jare en Kuritibo dum la 53-a Brazila Kongreso de Esperanto estos aparta ekzamensio, ne ligita al TES. Kandidatoj el diversaj partoj de Brazilo (v. tabelon 3) estos akceptitaj; nivelon/tipon de ili elektitaj mi montras en bildo 1. Rimarkindas, ke C1K estas la plej populara elekto. Ses el la 25 kandidatoj estas virinoj; kvankam la proporcio (24%) estas pli alta ol la averaĝo de niaj ses antaŭaj ekzamenoj (17%), ĝi ja daŭre estas malalta...




Tabelo 2 – KER-Eo en Brazilo.

Urbo	Jaro(j)
Braziljo	2011
Florianopolo	2014
Kuritibo	2012 – 2018
Macejoo	2013, 2015 – 2017
Pirasikabo	2010
Recifo	2018
Rio-de-Janeiro	2015
San-Paŭlo	2011

Tabelo 3 –Kandidatoj de 2018: distribuo laŭ loĝloko.

Loĝloko	Kandidatoj
BA	2
CE	1
DF	1
MS	2
PE	3
PR	6
RJ	4
RN	2
RS	1
SC	1
SP	2
Entute	25



Bildo 1 – Ekzamenoj dum la 53-a BKE laŭ nivelo kaj tipo (S – skriba, P – parola, K – kompleksa).

La ĉefan organizadon de KER-Eo faras Katalin Kováts. Kunorganizas la sesion: Rita de Moraes, Lígia Penia, Rangel Gotardi, Regis Gotardi kaj José R. Tenório. Disponigis sin surloke helpi spertaj ekzamenantoj/organizantoj: Paulo Nascentes, Josias Barboza kaj Aristóphio Alves Filho. BEL kaj BEJO disponigis subvenciojn al kandidatoj. La ekzamenejo estos en Centro de

Lingvoj kaj Interkulturo de UFPR, kiu akceptis ĉiuj antaŭajn ses sesiojn, kaj kie Esperanto estas instruata ekde 2005. Pro tio, ni registras specialan dankon al la Direktoro de la Centro, Docento Luiz Maximiliano Santin Gardenal, kiu estas la Protektanto de la Sesio. ■

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

CNPJ: 00.406.504/0001-06 Registro: 2321 em 08/09/1987

DEMONSTRAÇÃO DE RESULTADO DO EXERCÍCIO - Analítico / Acumulado

Folha: 0023
Emissão: 29/01/2018
Período: 01/2017 a 12/2017.

Conta Contábil	Descrição	Saldo Atual
3	RECEITAS	135.180,16
3.1	RECEITAS	135.180,16
3.1.1	RECEITA DE CUSTEIO	82.419,01
3.1.1.1	CONTRIBUIÇÕES DE ASSOCIADOS	82.419,01
3.1.1.1.000004	ANUIDADES SOCIAIS	49.410,00
3.1.1.1.000005	DONATIVOS DIVERSOS	32.378,01
3.1.1.1.000006	DOAÇÕES EM DINHEIRO	631,00
3.1.2	RECEITAS DE VENDAS	24.590,38
3.1.2.1	RECEITAS DE VENDAS	24.590,38
3.1.2.1.000001	VENDAS DE LIVROS A VISTA	24.590,38
3.1.4	RECEITAS FINANCEIRAS	7.169,75
3.1.4.1	RECEITAS FINANCEIRAS	7.169,75
3.1.4.1.000001	RENDIMENTO DE POUPANÇA	4.000,20
3.1.4.1.000002	RENDIMENTO DE APLICAÇÃO	3.169,55
3.1.5	OUTRAS RECEITAS EVENTUAIS	21.001,02
3.1.5.1	RECEITAS EVENTUAIS	21.001,02
3.1.5.1.000001	ALUGUEL DE SALAS	21.001,02
4	DESPESAS OPERACIONAIS	-160.748,66
4.1	DESPESAS ADMINISTRATIVAS	-33.425,96
4.1.1	DESPESAS ADMINISTRATIVAS COM PESSOAL	-33.425,96
4.1.1.1	DESPESAS ADMINISTRATIVAS COM PESSOAL	-33.425,96
4.1.1.1.000001	DECIMO TERCEIRO SALARIO	-1.512,88
4.1.1.1.000002	FERIAS	-2.343,13
4.1.1.1.000003	SALARIOS E ORDENADOS	-16.067,87
4.1.1.1.000005	FGTS	-1.680,85
4.1.1.1.000006	INSS	-5.282,23
4.1.1.1.000015	VALE TRANSPORTES	-2.043,00
4.1.1.1.000016	VALE ALIMENTAÇÃO	-4.496,00
4.2	DESPESAS ADMINISTRATIVAS GERAIS	-122.841,80
4.2.1	DESPESAS ADMINISTRATIVAS	-122.841,80
4.2.1.1	DESPESAS DA ADMINISTRAÇÃO	-61.554,92
4.2.1.1.000004	BENS DE POUCA DURAÇÃO	-2.300,00
4.2.1.1.000006	MANUTENÇÃO E REPAROS	-1.126,00
4.2.1.1.000007	CONSERVAÇÃO E LIMPEZA	-6.569,85
4.2.1.1.000009	IMPRESSOS DIVERSOS	-2.168,00
4.2.1.1.000010	LUZ	-2.551,47
4.2.1.1.000011	MATERIAL DE CONSUMO	-85,16
4.2.1.1.000013	DESPESAS DIVERSAS	-8.295,91
4.2.1.1.000016	SERVIÇOS TERCEIROS - PESSOA JURIDICA	-21.984,00
4.2.1.1.000017	CORREIOS E MALOTES	-6.383,22
4.2.1.1.000019	LIVROS, REVISTAS E JORNAIS	-5.708,00
4.2.1.1.000021	TELEFONE	-3.336,21
4.2.1.1.000022	FRETES E CARRETOS	-628,65
4.2.1.1.000023	MATERIAL DE EXPEDIENTE	-418,45
4.2.1.2	CUSTO DAS MERCADORIAS VENDIDAS	-18.167,34
4.2.1.2.000001	COMPRAS A VISTA	-3.065,26
4.2.1.2.000006	ESTOQUE FINAL	275.644,15
4.2.1.2.000007	ESTOQUE INICIAL	-290.746,23
4.2.1.3	IMPOSTOS E TAXAS	-43.119,54

B
r
a
z
i
l
a

E
s
p
e
r
a
n
t
i
s
t
o

12

N
r
o

3
6
0

M
a
j

2
0
1
8

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

CNPJ: 00.406.504/0001-06 Registro: 2321 em 08/09/1987

DEMONSTRAÇÃO DE RESULTADO DO EXERCÍCIO - Analítico / Acumulado

Folha: 0024

Emissão: 29/01/2018

Período: 01/2017 a 12/2017.

Conta Contábil	Descrição	Saldo Atual
4.2.1.3.000001	IPTU/IPVA	-6.130,70
4.2.1.3.000002	TAXAS DE CONDOMINIO	-36.788,49
4.2.1.3.000004	PIS S/FOLHA	-200,35
4.3	DESPESAS FINANCEIRAS	-4.480,90
4.3.1	DESPESAS FINANCEIRAS	-4.480,90
4.3.1.1	DESPESAS FINANCEIRAS	-4.480,90
4.3.1.1.000001	JUROS PASSIVOS	-37,69
4.3.1.1.000002	COMISSÕES E DESPESAS BANCARIAS	-4.356,56
4.3.1.1.000004	MULTAS FISCAIS	-86,65
RESULTADO BRUTO DO PERÍODO		-25.568,50
RESULTADO LÍQUIDO DO PERÍODO		-25.568,50

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO
 EVANDRO FERREIRA DE AVELLAR
 PRESIDENTE
 CPF: 076.721.897-77

CONTAST CONTABILIDADE E ASSESSORIA TECNICA LTDA ME
 03082341000141
 000824/O
 FRANCISCO SOARES DE OLIVEIRA - SOCIO ADMINISTRADOR
 002374 - CPF: 042.370.051-00

B
r
a
z
i
l
a

E
s
p
e
r
a
n
t
i
s
t
o






13

N
r
o

3
6
0

M
a
j

2
0
1
8



BEL@Butiko

<http://belabutiko.esperanto.org.br>



Flávio Fonseca
brazilakolekto@gmail.com

Kio estas tio? Ĉu albumo de brazila muziko? Ĉu albumaro? Ĉu koncerto enhavanta tradukitajn kaj originalajn kantojn? Ĉu retejo kiu arigas tiajn muzikaĵojn? Kion fine tiu kolekto kolektas?

Fakte, ĉiuj supraj elektoj estas ĝustaj.

Brazila Kolekto estas projekto jam plurjaraĝa, kiu kreskis iom post iom, etendis siajn branĉojn disradie, kaj firmiĝis kiel grava ilo por propagando de Esperanto, por edukado kaj amuzo.

Kiel edukilo, ĝi povas esti uzata kiel komplementa instrumaterialo: por tekstokompreno, poezifarado, stilokomparo, traduktekniko ktp. Amuziĝi per ĝi estas facile: gitarludantoj (aŭ aliaj instrumentistoj), poemŝatantoj, literaturamantoj, videospektantoj, ĉiuj povas profiti de la retejo.

Kaj la propaganda avantaĝo estas dudirekta: samtempe Esperanto estas diskonigata al homoj el la tuta mondo kiuj ŝatas brazilan muzikon, kaj nia landa kulturo estas prezentata al ĉieaj esperantistoj.

La historio

Ĉio komenciĝis en 2002. Pere de Pasporta Servo gastigis ĉe mi la argentina muzikisto Alejandro Cossavella. Facile naskiĝis inter ni frateca rilato, kaj tuj burĝonis kultura okulbriliga projekto: registri brazilajn kantojn profesikvalite.

(Nu, nun mi devas precizigi la aferon dirante, ke ververe tiu ĉi historio startis jardekojn antaŭe, kiam mi komencis kolekti bonajn versiojn de konataj kanteblaj brazilaj. En 2002, mia teko jam enhavis iom pli ol centoj da

tiaj perloj, far diversaj tradukintoj.)

Do, de la ideo mi kaj Alejandro tuj iris al plenumo, kaj kombinante kelkajn senvortajn instrumentajn akompanaĵojn kun novaj ideoj, gitaroj kaj aliaj muzikiloj, ekaperis konkreta materialo. Li vojaĝetis por ekkoni la faman bienon Bona Espero, dum mi poluris, muntis, finpreparis la registraĵojn. Post malmultaj tagoj, reveninte li, la voĉoj estis aldonitaj kaj jen! Sekve al ĉirkaŭ dusemajna laboro ni ekhavis la albumon Tom Jobim en Esperanto, en rekorda



tempodaŭro.

Kvankam la produktado estis hejmfarita, la kvalito superis la esperon. Tial, la entuziasmo eksplodis kaj la planoj multobliĝis: ni volis fari skatolon kun dekkvar albumojn, fokusante dekkvar gravajn brazilajn artistojn. La centra "B" de la nomo Jobim estis diferencigita kaj fariĝis la unua de sekvo el kiu legeblas la titolo Brazila Kolekto.

En tiu jaro la UK estis okazonta en brazila urbo Fortaleza, kie mi estis lanĉonta jam du KDojn – Simbiozo, kun Geraldo Mattos, kaj La Korvo, kun voĉo de Leopoldo Knoedt –, do simple mi alportis unu plian kaj faris trioblan lanĉon.

Tiam alvenis la momento formaligi la projekton de la KD-skatolo. Planado de detala strukturo, esploroj de buĝetoj, elpenso de financaj kompensoj por subtenontoj... kaj ekserĉado de apogemuloj. Oficialaj institucioj, komercaj entreprenoj, mecenatoj... kaj la jaroj pasadis.

La retejo

En la frumateno de la 7^a de septembro 2017, plej grava oficiala dato de Brazilo, mi vekigis sentante raran energion. Kaj ideo jam ŝvebinta en mia menso senceremonie konkretiĝis kaj leviĝigis min. Mi rapidis al la komputilo kaj ekla-

boris. Ĉirkaŭ la tagmezo estis preta la unua ret-paĝo Brazila Kolekto. Tiam ĝi estis simpla blogo, ankoraŭ sen propra retadreso, sed jam prezentanta parton de mia enteka privata kolekto da bonaj esperantigoj de brazilaj muzikaĵoj. Kaj tiel, pripensis mi, tiu riĉa materialo ne perdiĝos forgesita en tirkesto.

La kresko estis fulma. Legantoj, muzikamantoj, studemuloj de la tuta mondo estis allogataj kaj akompanis la publikigadojn. Kaŝiĝintaj tradukintoj aperis, ekstradukintoj reektradukis, novaj esperantistoj iĝis tradukantoj – la teko dikiĝadis kaj la reta kolekto pligrandiĝis.

Novajoj akumuligis: paĝoj pri ĉiu aŭtoro kaj tradukinto, akordoj por gitaro, divido laŭ stiloj, kreo de specialaj kategorioj (duoblaĵoj, versio de versio ktp), partituroj, videoj kaj multaj aliaj.

Nuntempe ĝi estas vigla retejo kun propra adreso (www.brazilakolekto.com), pli ol kvindek mil paĝvidoj, pli ol cent aŭtoroj kaj dekoj da tradukintoj (multaj el aliaj landoj). Ĝi havas konton ĉe Instagram, Twitter, Facebook, kanalon ĉe Youtube kaj ankoraŭ multajn planojn por la estonto.


La koncerto

Kiel natura sekva paŝo, mi ekpensis prepari tiun repertuaron por viva prezentado. Kvazaŭ divenante miajn fantaziojn, LKK de 53^a BKE



Nenio okazos denove

brazilakolekto.blogspot.com



Ajna kanzon'

brazilakolekto.blogspot.com

invitis min por koncerto en Kuritibo.

Bonsance, mi konas kompetentan muzikiston en tiu urbo, nome Rubens Holzmann, amiko kun kiu mi jam vojaĝis kaj koncertis en UK de Prago, en 1996. Tio tre faciligis la interkonsentojn, ĉar mi petis lin kunigi lertajn instrumentistojn por akompana bando, kio malaltigis la kostojn. Kaj la bando konsistis el elektra gitaro, blovinstrumentoj (alda kaj soprana saksofonoj kaj fluto), basgitaro kaj drumo, krom miaj voĉo kaj sepkorda gitaro.

La buntecon de la programo nutris Brazila Kolekto. Bosanovo, bajono, sambo, popo, ĵazo. Kiel montrofenestro tiu koncerto montris al la bela publiko specimenojn de la retejo.

La kampanjo

Kaj Brazila Kolekto atingis mejloŝtonon en sia ekzistado. Por daŭrigi la vojon kvalite ĝi bezonas helpon. Estas necese starigi almenaŭ etan skipon por cifereca merkatumado, preparado de artikoloj, partituroj kaj aliaj muzikaj dosieroj, kaj aliaj taskoj.

Tamen la ĉefa paŝo nun estas la produktado de originalaj muzikvideoj. La intenco estas, en la unua etapo, dungi profesiajn muzikistojn, krei novajn muzikaranĝojn kaj registri la plenumon en studio per du aŭ tri kameraoj. Poste, en pli maturiĝinta etapo, mendi gvidtekston por

scenaro filmota eksterstudie, kun pli da muzikistoj kaj teknikaj rimedoj.

Por realigi tiajn revojn, estas kreita perreta konstanta kampanjo, ĉe www.catarse.me/brazilakolekto. Tiamaniere, ajna esperantisto aŭ simpatianto kun la internacia lingvo povas kunlabori por subteno de la retejo Brazila Kolekto.

La kampanja sistemo funkcias same kiel abonado: la kunlaboranto ĉiumonate ricevas rekompenson pro la apogo, laŭ ĝia kategorio. Estas facile, ĉiuj povas partopreni kaj minimume lasi sian nomon en la retejo aŭ en la produktotaj videoj. Kaj tiel la laboro daŭros profitodona kaj ĉiam pliampleksiĝanta.

Ankaŭ vi fariĝu abonanto de Brazila Kolekto! Ni kune disvastigu nian karan lingvon pere de la brazila muziko, ni helpu ĵusbakitajn movadanojn senti sin fieraj pro niaj atingoj, ni stimulu novajn esperantistojn kaj artistojn ekkrei belajn verkojn. La Kolekto estas nia!



**Ni kore dankas la unuajn amikojn apogantajn
la kampanjon Brazila Koleto**

Adonis Marcelo Saliba Silva
 Adsney dos Santos
 Alcione Dávalos Fernandes
 Allan Argolo
 Amarílio Carvalho
 Ana Maria da Costa Ribeiro
 Ana Oliveira
 Anderson Delgado
 André Araújo
 Anna Lobo de Carvalho
 Ariel Loyelo
 Aristophio A. Alves Filho
 Ataíde Diniz de Godoi
 Carlos dos Santos Silva
 Carlos Jorge Rodrigues
 Cícero Soares
 Daniel Barcellos
 Darci Gomes Sardinha
 Dinalva Gomes Nolasco
 Dirce Salles
 Edison Matos de Oliveira
 Elisia Martins de Oliveira
 Emerson Antônio da Silveira Melo
 Emilio Carlos Vaz Cid
 Eurípedes Alves Barbosa
 Evandro Ferreira Avellar
 Fabíola Carvalho
 Felicíssimo Rosa Borges
 Fernando Jorge Pedrosa Maia
 Fernando Jorge Pedrosa Maia Júnior
 Fernando Shayani
 Flávio Fonseca
 Francisco Mattos
 Gilberto Toste da Gama
 Graça Eliana Santos
 Herbert Welker
 Iraneide Morais
 Itacir Luchtemberg
 Jacinto Yogui
 James R. Piton
 João Otávio Veiga Rodrigues
 João Silva dos Santos
 José Carlos Valim
 José Joaquín Lunazzi
 José Roberto Alves de Albuquerque
 José Sartori Chaves Burger
 Josias Matos de Almeida
 Karina Oliveira
 Karlo Quadros
 Leandro Silvestre
 Luiz Carlos Fontes Romualdo
 Marcelo Mota
 Marcia Maria Souza Cunha

Marco Roncatti
 Margarete Welker
 Maria Barcellos
 Maria Eurípedes de Queiroz
 Maria Nazaré de Carvalho Laroça
 Muriel Acioli
 Néia Lúcia Souza
 Nivaldo Paiva
 Odília Milhomens de Azevedo
 Oscar Pereira Filho
 Osvaldo Fonseca da Ponte
 Paulo Belarmino da Rocha Júnior
 Paulo Eduardo de Brito
 Paulo Nascentes
 Paulo Roberto de Freitas Carvalho
 Paulo Rodrigues de Oliveira
 Rachel Barcellos
 Raimundo Santos
 Renata Ventura
 Ricardo Potozky de Oliveira
 Rogener Barbosa
 Rosangela Sousa
 Sandra Alencar
 Sidney Assis Brasil
 Sidney Carlos Praxedes
 Susana Zilli de Mello
 Tânia Maria Fernandes Paixão
 Tarcísio de Lima
 Terezinha Petronília Leão dos Santos
 Vicente Sales
 Vinício de Assis Gomes da Silva
 Vinícius Oliveira
 Vitor Monteiro
 Waldir Antonio Silvestre
 Wandemberg Morais
 Wolmar Campostrini
 Zózimo Pereira Costa
 Kaj multaj aliaj!

B
r
a
z
i
l
a

E
s
p
e
r
a
n
t
i
s
t
o

17

N
r
o

3
6
0

M
a
j

2
0
1
8



Se vi volas esti parto el tiu amikaro, aliru

<https://www.kickante.com.br/campanhas/concerto-brazila-kolekto-brasil-em-esperanto>

kaj lasu vian kontribuon. Ni plej kore vin dankas!

Programo - 53-a BKE kaj 38-a BEJK

B
r
a
z
i
l
a

E
s
p
e
r
a
n
t
i
s
t
o

18

N
r
o

3
6
0

M
a
j

2
0
1
8


QUINTA-FEIRA		
Hora	Memorial	Sala 1: Geraldo Matos
16h20 - 17h	Missa (Arcebispo Dom Peruzzo)	Distribuição de material dos congressistas
17h - 18h	Movada Folro + Interkona Vespero	
18h - 20h	Solena Malfermo	

DOMINGO		
Hora		Memorial de Curitiba
08h - 10h	Corrida e Caminhada do Esperanto	Libroservo
11h - 12h	Ago-tago	
13h - 14h30	Solena Fermo + Oficiala Kongresa Foto	
14h45 - 16h	Apresentações artísticas	

SEXTA-FEIRA							
Hora	Memorial	Sala 1: Geraldo Matos	Sala 2: Sylla Chaves	Sala 3: Ismael Gomes Braga	Sala 4: Paulo Silas	Sala 5: Carlos Domingues	Sala 6: Rogério Carneiro
09h - 09h50	Pavilhão étnico (PEA)	Libroservo	ILEI: Brazila sekcio (Aristóthio A Filho)	ISAE: Kunsido por sciencamikoj kaj sciencemuloj (Wendel Pontes)	La studo pri Esperanto en Brazilo kiel scienca temo el la lingvistika vidpunkto: ĝisnunaj atingoj kaj ontaj perspektivoj (Karina Oliveira)	Curso Intensivo de Esperanto (Josias Barboza)	Guflujo
10h - 10h50			Facilajoj kaj malfacilajoj de Esperanto (Herbert A. Welker)	Reunião com ativistas, associações e clubes esperantistas do Brasil (Joacir Camboim, Rodrigo Tavares, Wendel Pontes)	Kategorio dispele kaj hilemorismo ĉe Aristotelo: enkonduketo en Aristotelan filozofion (Euleax Elias)		
11h - 11h50			ILEI Brazilo: Kunsido de E-Instruistoj kaj kursgvidantoj (Aristóthio A Filho)	Astrologio: ĉu scienco aŭ arto? (Adonis Saliba)	Feminismo, nigra kaj GLAT-a movadoj (Karina Oliveira, Allan Argolo kaj Querino Neto)		
12h - 14h	PAUSA						
14h - 14h50	ASSEMBLEIA GERAL DA ORGANIZAÇÃO DA JUVENTUDE ESPERANTISTA BRASILEIRA	Libroservo	Poeziumado: vojo al plej alta lingvonivelo (Paulo Nascentes)	Esperanto: kiel atingi la interretanojn? (Adonis Saliba)	La retejo Brazila Kolekto (Flávio Fonseca)	Curso Intensivo de Esperanto (Josias Barboza)	Guflujo
15h - 15h50			Gripoj kaj Malvarmumoj (Carlos Andrade)	A utilização de ferramentas analógicas e digitais para obter a fluência em esperanto e o fortalecimento do movimento esperantista no Brasil (Rodrigo Tavares, Wendel Pontes)	Stel-Domo: arkitektura trezoro de Esperantujo (Ivan Eitd Colling)		
16h - 18h							
18h - 18h50	ASSEMBLEIA GERAL DA LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO					Oficina de leites vegetais (Matheus Arantes, Kenrya Torres)	
19h30 - 21h	ARTA VESPERO (Jorge Teles)						

SÁBADO							
Hora	Memorial	Sala 1: Geraldo Matos	Sala 2: Sylla Chaves	Sala 3: Ismael Gomes Braga	Sala 4: Paulo Silas	Sala 5: Carlos Domingues	Sala 6: Rogério Carneiro
09h - 09h50	PALESTRA PÚBLICA E DISCUSSÃO: ESPERANTO - ENSINO, PESQUISA E EXTENSÃO (BEL + BEJO)	Libroservo	Atelero pri minilbroj kaj aliaj rakontoj (José R Tenório)	Interagaj parolokazoj pri polemikaj temoj (Josias Barboza)	La kurso de Esperanto por parolantoj de la portugala en Duolingo (Karina Oliveira)	Kurso pri tridimensia fotografo (José Lunazzi)	Guflujo
10h - 10h50					Rumanio, mioritika lando (Manuela Burghelca)		
11h - 11h50			Praktikado de Taj Ĝi Ĉuano (Carlos Andrade)	Reunião com ativistas, associações e clubes esperantistas do Brasil (Joacir Camboim, Rodrigo Tavares, Wendel Pontes)	Kio estas veganismo kaj kiel plifacile fariĝi vegano? (Pedro Freitas)		
12h - 14h	PAUSA						
14h - 14h50	La Roka Kastejo (Vinicius Pereira)	Libroservo	Unua Konkurso de Krucvortengimo (José R Tenório)	Biohakerado: ciborgoj, genetika manipulado kaj edukado (Raul Cândido)	Kiel plibone ŝpari elektran energion? (Sarah Monteiro)	Kunsido pri Spiritismo (Lorenz)	Guflujo
15h - 15h50	Tiradentes: fidoplena maritro (Amarillo Carvalho)		Esperanto en librobiensalo de Rio 2019 (Márcio Santos)	Biblioteka kuriero (Néia Lúcia)	Mitologio de la Oriŝaĵoj (Allan Argolo)	La libro Birda Grundo (Nazaré Laroca)	
16h - 16h50	Apresentação musical (Uchôa Negro)		Portretoj kaj Memporetro por Eterne (José Lunazzi)	Interfero de la portugala dum la lernado de Esperanto (Herbert Welker)	Desenvolvimento de Mitologia Esperantista (Vinicius HPR)	Rapidaj masaĝoj (Carlos Andrade)	
17h - 19h	MESA: MOVIMENTOS PELA PAZ (Fraternidade Sem Fronteiras, AIESEC, TEJOUEA)						
19h30 - 21h	ARTA VESPERO (Flávio Fonseca)						

La protektantoj de niaj kongresaj ĉambroj




GERALDO MATTOS (1931-2014) estis brazila filologo kaj Esperanto-poeto. Diplomita pri la latina kaj latinidaj lingvoj, doktoro pri filologio. Li estis profesoro ĉe Federacia Universitato de Paranao en la urbo Kuritibo dum 30 jaroj. En la portugala lingvo li verkis

porlernejanan vortaron kaj pli ol tridek librojn pri la instruado de la portugala kaj pri Lingvistiko. Li eklernis Esperanton en 1947 kaj enamiĝis al la sistemo de participoj. Liaj unuaj libroj kun poezio en Esperanto aperis en 1953, inter ili "Ivan la Sesa", kvinakta tragedio. Li tradukis konatajn brazilajn verkojn al Esperanto, kiuj sinsekve aperis libroforme. En la lastaj jardekoj li dediĉis sin al esperantologiaj kaj prilingvaj studoj. Geraldo Mattos estis membro de la Akademio de Esperanto ekde 1970 kaj prezidis ĝin inter 1998 kaj 2007. Li estis gravulo ankaŭ en la Rozkruca Movado.



SYLLA Magalhães CHAVES (1929-2009) estis brazila verkisto, pedagogo kaj aktivulo en la brazila Esperantomovado. Magistro pri komunikado en Stanford (Usono), li

dum tempo estis UN-oficisto. Li ankaŭ studis juron en Rio-de-Janeiro kaj kibernetikan pedagogion en Paderborn (Germanio). Li ekaktivis kiel esperantisto en 1946 kaj en Parizo partoprenis en kabaredo "Tri Koboldoj" de Raymond Schwartz. Li estis premiita en pluraj belartaj konkursoj de UEA kaj liaj verkoj eniris diversajn antologiojn aŭ aperis ankaŭ kased- kaj diskoforme. Multaj liaj lernolibroj kaj vortaroj helpis la formadon de tuta generacio de brazilaj esperantistoj. Sylla Chaves estis membro de la Akademio de Esperanto por la periodo 1986-1996, aktiva membro de SAT kaj nomumita Honora Membro de UEA en 1992.



ROGÉRIO CARNEIRO (1941-2017) estis brazila advokato kaj esperantisto, kiu naskiĝis en Bahia. Li finance apogis diversajn E-instituciojn kaj agadis en la federacia ĉefurbo Braziljo, kie li prezidis Esperanto-Asocion. Li partoprenis plurajn naciajn kaj internaciajn aranĝojn. Dum multaj jaroj li faris fakajn servojn pri juro al Brazila Esperanto-Ligo. Li estis fervora esperantisto kaj membro de Universala Esperanto-Asocio, Brazila Esperanto-Ligo, Esperanto-Asocio de Braziljo, Taguatinga Esperanto-Klubo. Okaze de la 39a Brazila Kongreso de Esperanto, en la urbo Maceió-AL (2004), li estis elektita kiel vicprezidanto de "Federacia Konsilantaro". Rogério Carneiro naskiĝis en Conceição do Coité, ŝtato Bahia, la 29an de

novembro 1941. Unu el la ĉefaj trajtoj de Rogério estis lia konstanta vigleco kaj senlaca entuziasmo pri la esperantaj aferoj.

La protektantoj de niaj kongresaj ĉambroj



CARLOS Augusto Guimarães DOMINGUES (1896-1974) estis brazila advokato kaj esperantisto. La lingvon li eklernis en 1909. Li estis estrarano de Brazila Esperanto-Ligo kaj ankaŭ de Brazila Geografia Societo kaj dumviva membro de Brazila


Ĵurnalisa Asocio. Redaktoro de oficialaj revuoj de Brazila Geografia Societo, de Kontoscienca Societo kaj de "Brazila Esperantisto". Ĉefdelegito de UEA, li reprezentis la registaron de Brazilo ĉe la 18-a kaj 21-a Universalaj Kongresoj de Esperanto. Akademiano ekde 1949, li estis Komitatano de UEA de 1935 ĝis la morto. Li estis kunredaktoro de Portugala-Esperanta vortaro kaj aŭtoro de multaj verketoj, i.a. de artikoloj por "Enciklopedio de Esperanto".

Paulo SILAS RODRIGUES SENA (1990 -2017) estis juna esperantista poeto el Brazilo. Li profesie laboris kiel administra asistanto ĉe la Universidade da Integração Internacional da Lusofonia Afro-Brasileira (UNILAB) en Fortalezo, la ĉefurbo de la brazila ŝtato Ceará. Ĉe la sama universitato li instruis Esperanton, kion li mem lernis en 2008. Li estis tre aktiva membro de la internacia esperantista movado, kontribuante al diversaj publikaĵoj. Interalie al la literatura revuo Beletra Almanako, al la feminisma blogo Egalecen kaj al la porjunulara revuo Kontakto. Li ankaŭ estis tre aktiva ĉe sia YouTube-kanalo, kie li publikigis diversajn videojn en kaj pri Esperanto. Aldone al Esperanto, li ankaŭ estis defendanto kaj antaŭenpuŝanto de la indiĝenaj lingvoj de Ameriko, kiel la papiamenta lingvo. Li ankaŭ kontribuis al la Esperanto-traduko de Ubuntu.



ISMAEL GOMES BRAGA (1891-1969) estis brazila librotenisto kaj Esperanto-vortaristo. Lerninte Esperanton en 1912, li jam en 1914 fariĝis unu el la plej grandaj disvastigantoj de Esperanto en Minas Gerais. Li agadis en

spiritismaj rondoj kaj abunde verkis artikolojn. En 1937 li starigis la Esperanto-departementon de Brazila Spiritisma Federacio (FEB) en Rio-de-Janeiro kaj ekuzis ties presejon por eldonado de multaj verkoj, spiritismajn kaj lernomaterialon. Li tradukis la ĉefverkon "La Evangelio laŭ Spiritismo" de Allan Kardec, kies unua eldono en Esperanto aperis en 1947. Li kompilis du gravajn E-vortarojn por portugallingvanoj en 1954 aperis lia 300-paĝa vortaro portugala-Esperanto, kiu ampleksiĝis en 1989 al preskaŭ 600 paĝoj per suplemento de Sylla Chaves. La alidirekta vortaro aperis du jarojn poste, en 1956, kun 159 paĝoj. Li eldonis dekojn da libroj



53ª BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO



38ª Brazila Esperantista Junulara Kongreso

REALIZAÇÃO:



PATROCÍNIO:



APOIO:



361°
praticorrer
ELITE

I CORRIDA e caminhada ESPERANTO pela Paz e Diversidade

Kit completo R\$50
Kit participante R\$35

03 JUNHO
parque Tingui, Curitiba, 08h

distâncias
CORRIDA 4K.8K . CAMINHADA E KIDS

inscrições: eliteeventos.com

KIT COMPLETO

I CORRIDA e caminhada ESPERANTO pela Paz e Diversidade

03 JUNHO
parque Tingui, Curitiba, 08h

I CORRIDA e caminhada ESPERANTO pela Paz e Diversidade

distâncias
CORRIDA 4K.8K . CAMINHADA E KIDS

Remetente:
Liga Brasileira de Esperanto
SDS, Ed. Venâncio III - sala 303
70393-902 Brasília-DF

Fechamento autorizado. Pode ser aberto pela ECT

53-a Brazila Kongreso de Esperanto - Kuritibo 2018



53-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO
38-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso

Loko: Centro Universitata UNINTER kaj Memorejo de Kuritibo
Dato: de la 31a de Majo ĝis la 3a de Julio 2018




Urba Promenado

Permesu al vi lernadon pri kulturo, pri la kolektiva transporta sistemo kaj pri la iniciatoj de la ĉefurbo de Paranao, por esti inter la urboj kun pli bona kvalito de vivo en Brazilo. Vizitu la parkojn kaj arbaretojn, omaĝantajn la etnajn grupojn, kiuj influis la lokan kulturon kaj vizitu la pli gravajn urbajn poŝtkartojn: Botanikan Ĝardenon, Operejon el "Drato" kaj Muzeon Oscar Niemeyer (Muzeo de la Okulo). Informiĝu pri horaro.

PLENKRESKULO
R\$ 132,00

INFANO DE 6 ĜIS 12 JARAĜA
R\$ 95,50



Nokta Promenado

Vespere promenu tra la urbo Kuritibo kaj admiru kelkajn turismajn vidindaĵojn, kiel, ekzemple, la Botanikan Ĝardenon kaj la Historian Centron kun ĝiaj centjaraj konstruaĵoj kaj pasu tra la lumigita Rua das Flores (Strato de la Floroj), ŝanco por vojaĝi en la tempo. Finfine alvenu al la bela "Santa Felicidade" (Sankta Felicecco), itala kvartalo kun vespermanĝo je pastajoj kaj kokidajoj. Informiĝu pri horaro.

PLENKRESKULO
R\$ 200,00

INFANO DE 6 ĜIS 12 JARAĜA
R\$ 138,00



Insulo de Mielo

Ĉi promenado eliras el Kuritibo, ĝis Terpinto de Paranao, de kie vi enbarkigos ĝis la Insulo. La surmara vojaĝeto daŭras ĉirkaŭ 30 minutojn kaj vi estos ĉikaŭata de la belaj pejzaĝoj de la marbordo de Paranao. En la insulo, vi havos ŝancon ekoni la lokajn allogaĵojn kiel, ekzemple, la Lumturon de la Konkoj, La Fortikaĵon de la Madono de la Plezuroj, krom libera tempo por bano en la plaĝoj. Informiĝu pri horaro.

PLENKRESKULO
R\$ 405,00

INFANO DE 6 ĜIS 12 JARAĜA
R\$ 294,00



Mondo de Beto Karrero

Pasigu tagon de aventuroj kaj amuzojn en la plej granda amuzparko de Latin-Ameriko kun ludiloj, spektakloj kaj vidindaĵoj por ĉiuj aĝoj! La bileto inkluzivas rondvojaĝon de Kuritibo al la Amuzparko Beto Karrero (Penja, ŝtato Sankta Katarino) kaj la enirpermesilon al la Parko. Informiĝu pri horaro.

PLENKRESKULO
R\$ 279,00

INFANO DE 4 ĜIS 09 JARAĜA
R\$ 269,00



Trajno "Morretes Antonina"

Vojaĝo per trajne tra la historio de la fervojo inter Kuritibo kaj Morretes sur reloj enkadrigataj de riveroj, akvofaloj kaj kanjonoj! La promenado inkluzivas viziton al la historiaj urboj de Morretes kaj Antonina, kaj tagmanĝon por gustumi la tradician pladon la "Barreado", originala el la regiono. La reveno al Kuritibo estas per buso. Informiĝu pri horaro.

PLENKRESKULO
R\$ 250,00

INFANO DE 6 ĜIS 12 JARAĜA
R\$ 176,00



Luksa dumtaga trajno

Ĉi tiu itinero kunigas promenadon en unu el la dek plej mirindaj trajnoj en la mondo, kun la sperto vojaĝi en la nura luksa trajno en Brazilo - elektita de "The Wall Street Journal" kiel unu el la tri plej multekostaj luksaj trajnoj de la mondo! Kaj vizito al du el la ĉefaj historiaj urboj de la sudo de la lando, ĉio kun la zorgo de turisma gvidisto kaj en la vagonoj plej luksaj. Informiĝu pri horaro.

PLENKRESKULO
R\$ 411,00

INFANO DE 6 ĜIS 12 JARAĜA
R\$ 279,00